Heinrich Heine,

# En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',
Dum birda kanto sonis,
De l' kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* FRIEDRICH PILLATH *(†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`.

Heinrich Heine,

# En la mirida bela Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)*

Heinrich Heine,

# En admirinde bela maj'

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

En admirinde bela maj',
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* HANS-GEORG KAISER *(Cezar, *1954-05-21).*

*Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.*